



## La rano kiu saltas

Jen la raneto kiu saltas. Facile estas elfari ĝin sed surekrane de komputilo iomete estas malfacile por mi klarigi al vi kiel ĝin fari. 😊 Tamen mi provu.




Male al la aliaj modeloj de mia TTT-ejo, la bazo de mia rano ne estas kvadrata, ĝi estas duono de kvadrato, pli precize: kvadrato duone sekcita per mediano. Do oni ekas la laboro per ortogamo formata de 2 kvadratoj kiuj havas unu komunan lateron, kaj kies la longo estas la duoblo de la larĝo.



Valfaldu laŭ la du diagonaloj de la du kvadratoj kaj montfaldu laŭ la medianoj paralelaj al la komuna latero. Vidu al la **desegno 1** la rezulton.


Sekvante la faritajn faldojn kaj alportante la du malgrandajn laterojn de la rektangulo sur la centron, vi obtenas la samon kiel sur la **desegno 2**: kvadraton kun 4 tavoloj de papero.



Nun suprenmetu la pintojn a kaj d sur H kaj malsuprenmetu la pintojn b kaj c sur G. Fronte al vi, estas 4 ortaj kaj isocelaj trianguloj kun komuna angulo en la centra O. Vidu al la **desegno 3** sur kiu mi aldonis la ruĝajn punktolineajn duonigantojn de la kvar ĉi supre diritaj anguloj.


Faldu laŭ tiuj bisekcantoj tiele ke la pintoj a, b, c, d moviĝu dekstren aŭ maldekstren kaj vidu al la **desegno 4**.

Returnante lateren vian laboraĵon vi divenas la ranon, ĉu ne? En H estos la kapo kaj 4 piedoj estas videblaj kiel sur la **desegno 5**. La bluj punktlineoj estas duonigantoj laŭ kiuj vi faldu, alportante HK kaj HL sur HG. Vidu al la **desegno 6** kaj faldante laŭ uv suprenmetu la pinton G.



La oranĝkolora rano montras du poŝojn ambaŭflanke de G. Ĉu vi vidas la poŝojn? Puŝu K kaj L en tiujn poŝojn. La rano estas preskaŭ finita... ankoraŭ du paralelaj faldoj, la unua monta kaj la dua vala same kiel sur la foto de la flava rano.

Nun atentu! Per la montra fingro premu sur G kaj rapide ellaŝu. Via rano saltis! sed eble ĝi ne refalis kun la piedoj sur la tablo... rekomencu tikleti ĝin ĝis longa salto kaj bona refalo. Se vi sukcesis vi ankaŭ povas salti!



El [www.corobu.com/rano.html](http://www.corobu.com/rano.html)